Kaj chio estas senshangha
(És minden változatlan)

Sur la tablo rompita glaso
elfluinta vino,
manghajhrestajho.
La festeno estas finita.
Iuj revenas ankorau,
shtelprenas iom da restajhoj
de la tablo,
trinkas el la boteloj
la restintan vinon.
Komence ili hezitas, sed poste
ilia vocho chiam pli brava,
akresona, fanfarona.
Ili jam ne auskultas unu la alian,
en kakofonio de iliaj frazoj
serio de sensignifaj vortoj .
Shancelighantaj ombroj sur la muro,
chirkaubrakumas la nokton.

Mene tekel fares

Sur la tablo rompita glaso
elfluinta vino,
manghajhrestajho.

Kaj chio estas senshangha.

Tradukita de János Ruff